The board discusses whether to include a summary of board discussions which take place on Slack, in order to provide members with a fuller picture of what the board does. *New Board Procedure: If a board member wants a discussion on Slack to appear in the minutes, they can include #minutes , and the secretary will summarize those discussions as an appendix in the minutes.* The secretary’s responsibility regarding this has been updated in Appendix C of the board handbook.


### Misc.

One person has requested a stipend to the UK, and several people have already stated their interest in creating new films for the American Good Film Festival.

---

## Mojoso

### senintenco esperantaĵo



Lastatempe unu el niaj legantoj (kies nomon ni ne mencias) afable atentigis nin pri la retejo “Mojo” – por viroj, kiuj suferas de erektiĝa misfunkcio. Li skribis: “Mi rimarkis, ke ĝi havas la adreson ‘mojo.so’. Kaj mojosa ĝi estas, mi supozas.”



# Are you promoting Esperanto effectively?

informado • Chuck MAYS

From Chuck Mays and the E-USA Promotion Committee.



Are you promoting Esperanto effectively? Most people are not. A few questions to help you evaluate yourself:

- Have you studied how to effectively promote something? Most likely you have not, since few of us have. If you have, wonderful!
- Do you use well-known and mostly false or unsupportable “facts” about Esperanto such as:
  - “Esperanto only has 16 rules of grammar.” If this were true, why are there books with hundreds of pages that explain the rules of Esperanto grammar!
  - “Esperanto is the easiest language in the world to learn.” Hmmm! For whom? Esperanto, like any language requires time, practice, and a lot of effort to learn.
  - “There are between 1–2 million speakers.” Can this number be verified? No, it cannot, and it is not credible to state the number of speakers since the number is not knowable.
  - “Esperanto is the language of peace.” Really? Based on what?

I need to be truthful and admit that I have used these “facts” (and others) to promote Esperanto, and without much to show for it.

- Have you read the very good book *Esperanto Sen*

*Mitoj* by Sikosek? Probably not. It is worth reading and a **free PDF sample is available from the publisher** <<https://retbutiko.be/Provlibroj/esmi.pdf>>. Warning: the entire book is 300 pages long!

- Do people have a tendency to push back because Esperanto seems too good to be true?
- Are you happy with the results of your promotion activities?
- Have you had training on how to effectively promote Esperanto? An on-line mini-course by Esperanto-USA would be very helpful to solve this need. Let your regional helper know that you are interested in a course on how to effectively promote Esperanto.

It is a common tendency to paint Esperanto in the best light. However, it can be counterproductive to oversimplify and to state facts that are not true or that cannot be verified. This can put you in the position of defending Esperanto and the other person defending why they don’t obviously want to learn it. Good promotion gives real facts and information allowing the recipient to make up their own mind. If we all strive to do better promotion, then we will see results.

As an example, the Esperanto group in the Triangle area of North Carolina recently met in a park and displayed a banner “Esperanto Spoken Here.” This was true. We spoke our beautiful language, enjoyed each other’s company and our banner promoted Esperanto. Only one person showed interest, but that is a start.

Need feedback on your elevator speech, brochure, or promotional materials? Contact me at the email address below, and I and the promotion committee will give you our honest thoughts and ideas for improvements.

Happy promoting!

# Ĉu esperantistoj estas vere helpemaj?

leterkesto • Mark HAMME

Mark estas malliberula membro en Arizono, kiu dum jaroj studas Esperanton kaj instruas ĝin. Plurajn fojojn en niaj paĝoj – kaj per leteroj al UEA kaj ILEI – li petis helpon eldoni bultenon kaj fariĝi diplomita instruisto, sed ŝajne ĉiuj liaj petoj restas ignorataj.

Saluton! Leginte la anoncon pri la KER-ekzameno en N<sup>o</sup> 2021:6, mi volas rimarki, ke mi ankoraŭ ne ricevis helpon kun mia sep-jara, daŭra peto pri papera kursmaterialo kaj testo por iĝi Esperanta instruisto.



La nomita kunordiganto en la anonco estas unu el tiuj, kiuj NENIAM respondas leterojn, do mi atendas ankoraŭ, ke unu el miaj dekoj da leteroj pri tio al la estroj de UEA kaj ILEI trapiku la glaciajn korojn. Ne impresas min bone la fakto, ke UEA helpas al afrikanaj E-istoj kun la testo, sed ignoras dudekojn da leteroj de mallibereja membro ree kaj ree petante helpon, eĉ alvokinte telefone kaj ricevante nur neplenumotajn promesojn.

Oni povas skribi al Mark ĉe la jena poŝtadreso: Mark Hamme #33391-379 / USP / P.O. Box 24450 / Tucson AZ / 85734

## Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

For brevity, only expenditures of \$10 or greater are listed. Contact the Director of the CO at [info@esperanto-usa.org](mailto:info@esperanto-usa.org) if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our **Restricted Funds** <<https://bit.ly/3LzLlLK>> are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2022-02-02	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2022-02-14	UEA-V	6000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 5,272.09 EUR
2022-02-15	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2022-02-21	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2022-02-21	Federal & State Payroll Taxes	709	Salaries	Employee taxes
2022-02-21	HARRISWB	1722	Salaries	payroll
2022-02-25	ADP	55	Payroll Fees	fees
2022-02-26	BOA CC 7572 2-20	11	Internet Access	Dreamhost
2022-02-26	BOA CC 7572 2-20	27	Telephone/Fax	800 number
2022-02-26	BOA CC 7572 2-20	35	Licenses/Permits/Taxes	Maine annual statement
2022-02-26	BOA CC 7572 2-20	40	Credit Card Expenses	Payflow
2022-02-28	PAYPAL	71	Credit Card Expenses	Fees
2022-03-04	ENDICIA	130	Bulteno - Print & Post	UE 2021:6
2022-03-07	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2022-03-08	RAND PRINTING	278	Bulteno - Print & Post	UE 2021:6
2022-03-15	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2022-03-15	UEA-V	4000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 3632.06 EUR
2022-03-21	BOA CC 7572	27	Telephone/Fax	800 number
2022-03-21	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2022-03-21	BOA CC 7572	341	Internet Access	Dreamhost
2022-03-21	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2022-03-21	Federal & State Payroll Taxes	709	Salaries	Employee taxes
2022-03-21	HARRISWB	1722	Salaries	payroll
2022-03-25	ADP	55	Payroll Fees	fees
2022-03-31	PAYPAL	88	Credit Card Expenses	Fees

# Mikronoveloj

*Mikronoveloj* estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelo-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj estu precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli. Ĉu vi emas verki tiel? Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

## Bobeloj

Sidante en drinkejo, du amikoj parolas.



En iliaj bieroj, bobeloj leviĝas.

Viŝante sian vendotablon, la koktelisto spektas futbalan matĉon en soleca televidilo.

En angulo, paro rigardas sopire en la okulojn de unu la alia.

“Ni pensis, ke la afero finiĝos baldaŭ. Ni festis kvankam ni estis maltrankvilaj ... aŭ eble ĉar ni estis maltrankvilaj. Estis amuze vidi tiun flankon de li. Ni akceptis nian perdon, sed ni volis ridi pri la situacio – kune.”

“Do, ĉu li venas?”

“Li neniam respondis.”

La bobeloj ĉesas leviĝi kaj komencas malaperi.

Kelnerino haltas kaj demandas, “Ĉu vi bezonas ion

alian?”

“Ne ĉi-vespere”, murmuris la du.

— *Joshua HOLZER* <josh.holzer@westminster-mo.edu>

## Reala televido

Ŝi malfruis. La fraŭloj scivolis kial. Ili maltrankviliĝis, kelkaj pro amo sed aliaj nur pro la mono.



La konkursantoj estis similaj: junaj profesiuloj, sufiĉe belaspektaj por televido. Ili amindumis la fraŭlinon unu semajnon. Baldaŭ ŝi elektos edzon. Ŝi gajnos ringon — li, monplenan valizon: Antaŭe ili renkontis ties gardiston.

Hodiaŭ oni finfilmos. Kameraistoj pretas. Direktoro atendas. Aerbalono ŝvebas proksime, preta forporti la paron.

Tiam oni ekklarigas: “La fraŭlino ploras enĉambre, nekapabla elekti. ...” Sed de supre, frapsono interrompas.

Aerbalonisto ĵetas ŝnureskalon al fenestro. La fraŭloj povas nur rigardi dum la fraŭlino kaj gardisto grimpas, portante monvalizon, al la balono, jam leviĝanta ĉielen.


— *Debra HAMEL* <hamel.debra@gmail.com>

# Nu, ni manĝis lin ...

traduku! • HOSS FIROOZANIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj, komentoj, kaj proponoj.

**E**n N<sup>o</sup> 2021:6 mi proponis tradukdefion el *Modernaj Robinzonoj*, mirinda (kaj foje ŝoka!) aŭtobiografia rakonto pri la travivaĵoj de Teodoro SCHWARTZ en la unua mondmilito. Partoprenis en nia enangligo kvin bravaj tradukantoj: BS, CL, DH, KK, kaj MH. Ĉiuj liveris bonajn solvojn. Korajn dankon kaj gratulon al ili!



Reeldono de *Modernaj Robinzonoj* (Eldonejo Bero, 1999) de Teodoro SCHWARTZ.

En 1922, Schwartz fondis la gravan revuon *Literatura Mondo* en Budapeŝto, en kiu lia *Modernaj Robinzonoj* unue **aperis felietone**

<<https://bibliotekoj.org/literaturamondo/1923.htm>> de Junio ĝis Decembro, 1923. La rakonto reaperis **libroforme en 1999** <<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6118>> kun ampleksa enkonduko de Humphrey TONKIN.

La prozo de Schwartz havas sian propran, unikan stilon, kun bildigaj esprimoj ne ĉiam facile redoneblaj en la angla. Plejparte niaj tradukintoj interkonsentis en siaj proponoj, sed kelkaj partoj de la defio kaŭzis por ili iom da kapgratado.

## Rimarkindaj vortoj kaj frazoj

- **La renversigo de la ruĝa reĝimo** — Oni redonis la metaforon de faligo diversmaniere, per: *downfall*, *fall*, *overthrow*, kaj *toppling*. Ĉiuj en ordo, certe. En la riĉa vortstoko de la angla ekzistas ankaŭ aliaj ebloj, ekzemple *collapse* kaj *destruction*.
- **ili rifuĝis en la praarbaron** — *they fled into*;

*they sought/took refuge in; they sought safety in.*

Kompreneble, *rifuĝi* signifas “serĉi protekton kontraŭ danĝero,” Kutime, *fled* estus taŭga traduko ne por *rifuĝi*, sed por *fuĝi* (“forkuri por savi sin”). Tamen en tiu ĉi frazo, la akuzativo ĉe *praarbaron* implicas ankaŭ movon (fuĝon) tien: alivorte, ili fuĝis al la arbaro por rifuĝi en ĝi.

Ĉu Schwartz eble konfuzis la du vortojn? Interese, en siaj samepokaj “siberiaj romanoj”, Julio BAGHY (kiu efektive estis kolego de Schwartz) faris ĝustetion, ofte misuzante *rifuĝi* en la senco de *fuĝi*.

- **la praarbaro** — Kiom da kapoj, tiom da opinioj! Oni redonis la prefikson en kvin malsamaj manieroj; po unu por ĉiu tradukinto: *old*, *dense*, *old-growth*, *ancient*, kaj *antique*.

Aliloke en la teksto, Schwartz nomis la arbaron *tajgo*; temas pri la konifera arbaro de Siberio kaj aliaj borealaj regionoj. Alternante inter tiu vorto kaj la preskaŭ samsignifa *praarbaro*, li samtempe evitis troan ripetigon kaj aldonis senton de sovaĝeco.

En la angla ni jam havas *taiga*, sed la anglalingvaj elektoj por *praarbaro* ne estas tute kontentigaj. Kiel skribis CL:

My mind went immediately to “This is the forest primeval. The murmuring pines and the hemlocks ...” and then I wondered if anyone reads Longfellow anymore. In the Pacific Northwest we’d call such a forest “old growth” forest. Both of those terms seem kind of stilted for this story and I don’t know if a simple Austrian conscript would use a term like “boreal forest”—which would connect with the use of “taiga” a paragraph or two down. I probably could have just used “taiga” again, but in the end I decided to go with “dense forest,” since that helps to put across the idea that they escaped into a Grimm Brothers wood where they could more easily escape their predators (the human ones, anyway).



- *Oni ĉasis ilin, kvazaŭ la rabiajn hundojn* — Preskaŭ ĉiuj redonis *rabid*, sed CL elektis la pli idioman *mad*, kiu havas la saman sencon.
- ***Dolfi ekpuŝis la flankon de Sepi*** — Kelkaj tradukis laŭvorte, redonante *Dolfi shoved Sepi*; kaj *Dolfi gave Sepi a shove on his side*. Kvankam *shove* ja povas esti taŭga traduko en aliaj kunteksto, ĉi tie ĝi ŝajnas iom tro agresa. Efektive, Dolfi volis nur riproĉi sian kamaradon, ne lukti kun li.

Kelkaj tradukis *ekpuŝis* pli libere, anstataŭigante *flankon* per pli kutima anglalingva idiomaĵo: *Dolfi elbowed/poked/nudged Sepi in the ribs*.

- ***la bonapetita morto digestis ilin*** — Nekutima esprimo, ĉu ne? Ĝi utiligas metaforon ŝajne fremdan por la angla. La anglalingva morto malsatas, manĝas, voras, kaj eĉ forglutas ... sed strange, ĝi ne digestas.

Ankaŭ *bonapetita* estas nekutima esprimo, pli specifa kaj sukoplana ol *malsata*. Kompatinda CL diris:

I spent most of an evening trying to come up with an English equivalent for *bonapetita*. The closest I could come was "healthy appetite" which sounds more like we're describing a teenage boy than the Grim Reaper. I finally decided that "insatiable" put the same idea across, that death was consuming and digesting the members of the group.

Lia plena solvo estis: *they were consumed by death's insatiable appetite*.

Aliaj proponis: *death, that glutton, made short work of them; death devoured them, ravenous; death was eager to eat, and consumed them; ravenous Death consumed them*.

- ***La malsato turmente tordis niajn intestojn*** — Oni uzis diversajn metaforojn, sed plejparte konservis la kernan ideon de *tordo*: *Hunger tied our guts in knots cruelly; Hunger tortured us. It turned our guts inside out; Hunger twisted our intestines in torment; Our intestines writhed in agony from hunger; The famine tortured and twisted our intestines*.

Ĉiuj en ordo, tamen *guts* ŝajnas pli natura por anglalingva esprimo ol *intestines*, laŭ mi.

- ***nia malbenita sorto*** — Rekta traduko estas *our (ac)cursed fate*, sed kiel unu respondinto rimarkis, tio sonas iom arkaa. Oni proponis ankaŭ: *our wretched fate; our cursed luck; we were godforsaken*. Laŭ la kunteksto, eble taŭgas ankaŭ *pitiful, sad, miserable, tragic*, aŭ simile.

## La ne-sinteza traduko

Ĉi-foje mi prezentas *ne* tekston sintezitan el la proponoj, sed ion jam delonge eldonitan. En 2010, la eldonejo Mondial aperigis anglalingvan tradukon de *Modernaj Robinzonoj* fare de la estimata Humphrey TONKIN, do eble estos interese rigardi lian solvon.

Por havigi la tradukendan fragmenton en la defio, mi devis senkompatite koncizigi kelkajn paĝojn de la Schwartz-a teksto. Do, por havigi paralelan tekston de d-ro Tonkin, mi devis simile buĉi ankaŭ lian verkon. Por ĝui ĝin en ĝia tuteco, bv. vidi lian planan ***Crusoes in Siberia*** <<https://amzn.to/3LZioF0>>, kiu haveblas kaj papere kaj bite.

Dolfi and Sepi were prisoners of war who were recruited into the Red Army. When the Red regime collapsed, they took to the forest. They were pursued like mad dogs, and they suffered terribly together during those long days and months. Such suffering forged a strong bond of friendship between them.

"So, tell us. What was the worst of your adventures?" I once asked in curiosity, during a conversation about the terrors and perils of the taiga.

"When we ate our comrade Hans."

Dolfi dug Sepi in the ribs.

"Aren't you ashamed to talk about such things?" Dolfi whispered, but Sepi none the less quietly continued his story.

"At the time there were ten of us living together. To begin with, there were thirty in the group, but death with its healthy appetite consumed the rest. Hunger tore at our guts: we had nothing to put in our bellies. We had eaten the last remains of a

horse and we were already chewing desperately on its hooves and hair. The effects of hunger turned Hans crazy. We could hardly send him to the hospital, because there was no hospital to send him to. What could we do for our unfortunate comrade? We were hungry too, and so ... we ate him. As we ate, we talked of his and our unhappy fate. Later we ate someone else, but he had it coming to him: we punished him because he was guilty. He stole food from our provisions. ... But he tasted better than they did. Right, Sepi?"

I have the courage to tell this terrible story only to throw some light on the abyss into which war pushes us so-called human beings.

Por tiuj, kiuj volas kompari la tradukojn kaj vidi ĉiujn detalojn, en la reta versio de la artikolo vi trovos paralelan prezenton de la proponoj.



## La nova defio

Novaj defioj revenos en aŭtuno. Feliĉan someron!



## Postskribo

En la pasintnumera rubriko, mi dubis pri *kolera* por *angry* (*raindrops*) – mi timis, ke ĝi sonas en ordo al miaj oreloj eble pro misinfluo de la gepatra angla. Do mi demandis: “Ĉu en la literaturo de Esperanto ekzistas kutimo priskribi senvivajn aferojn per *kolera*?”

Senprokraste venis afabla respondo de la estimata Liven DEK:

Vidu la respondon en *Hamleto* (traduko de L.L. ZAMENHOF): “Ĉu esti aŭ ne esti, – tiel staras nun la demando: ĉu pli noble estas elporti ĉiujn batojn, ĉiujn sagojn de la kolera sorto ...”

Nu, kia pli bona modelo ol traduko de Zamĉjo mem?

---

## La diskonigo de Esperanto en Usono

de la prezidanto • Filipino DORCAS

**K**ion pri Esperanto vi deziras, ke multaj aliaj homoj sciuj? Ĉu vi volas, ke aliaj en Usono konu Esperanton?

Nu, kion diras niaj statutoj pri liverado de informoj?

### ANTAŬPAROLO

Esperanto-Ligo por Nordameriko, Inc. estas konstituita kiel neprofitcela eduka organizo, kies unua celo estas plua edukado kaj disvastigo de informoj pri la internacia helplingvo Esperanto ene de Usono.


Tiuj **unuaj vortoj** de nia statuto estas eble la plej gravaj reguloj, kiujn ni havas pri tio, kion ni devas fari. Via estraro de Esperanto-USA kunlaboras nun por restarigi la Komitaton por Diskonigo. Informi la publikon pri Esperanto estas tre granda projekto de vasta amplekso. Tamen, ĝi estas sufiĉe regebla kiam ni havas teamon de instigitaj planemuloj laborantaj kune por komuna celo.

### La Komitato por Diskonigo

Ĉu vi okupiĝas pri sociaj amaskomunikiloj? Ĉu vi estas kreema en cerbumado kaj kreado de reklamaj materialoj? Ĉu vi deziras uzi viajn komunikajn kapablojn por la antaŭenigo de la Esperanta komunumo en Usono? Ĉu vi iam ajn skribis gazetarajn anoncojn?

Se vi respondas jes al iu ajn el la supraj demandoj, ni bezonas vian helpon nun dum ni restarigas la komitaton. Se vi interesiĝas pri la projekto, bonvolu skribi al mi persone aŭ al alia estrarano. Dankon pro via intereso.

Ek kaj antaŭen!



### Filipo DORCAS

Filipo estas Prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

<filipo@grupoj.org>

# Kiu estu nia “mesaĝo”?

el la arĥivo • D. Gary GRADY

La jena artikolo unue aperis antaŭ kvaronjarcento, en la unua numero de *EsperantoUSA* en 1997.



**P**rofesiuloj pri reklamado kaj publikaj rilatoj kutimas demandi, “Kiu estu nia ‘mesaĝo’?”

Alivorte: Kion ni emfazu en nia informado? Kiujn ideojn ni volas restigi en la mensoj de homoj, post kiam ili legas informilon aŭ aŭdas prelegon pri Esperanto?

Tre valoras por esperantistoj interkonsenti pri almenaŭ unu ĉefa mesaĝo, ĉar ofte oni devas aŭdi aŭ vidi novan ideon multfoje, antaŭ ol oni komencas pensi pri ĝi serioze. Oni ja povas prezenti aliajn ideojn en nia informado, sed estas bone, se ĉiu reklamilo kaj informilo portas iumaniere la kernan mesaĝon.

(Ĉi tiu ne estas nova ideo. La romia senatano Cato – la pli aĝa – finis ĉiun sian parolon en la senato per la vortoj “Kartago detruenda estas.” Ni ne devas esti tiom rigidaj, kaj certe ne tiom perfortemaj, sed notindas, ke la senato fine agis, kiel Cato volis.)

En la pasinteco la kutima mesaĝo de Esperanto-aktivuloj estis, ke la mondo bezonas Esperanton. Tiu mesaĝo ne multe sukcesis pro la faktoj ke

1. Ĝi instigas nur kelke da homoj agi nun por lerni la lingvon kaj partopreni la movadon. La cetera homaro estas tute kontenta atendi ĝis la fina venko; kaj
2. Multaj homoj, prave aŭ ne, absolute rifuzas kredi, ke Esperanto iam atingos finan venkon. Eĉ multaj esperantistoj, inkluzive min, emas dubi.

Pro tio, mi konsilus, ke nia mesaĝo estu pli proksima al tiu de Kokakolo (la trinkaĵo, ne la birdparto):

“Esperanto pliriĉigos vian vivon.”

Parolante pri vojaĝado, korespondado, estonta lingvolernado, aŭ kio ajn, ni povas emfazi la nunajn avantaĝojn.

La avantaĝoj ne devas esti ĉiuj pure praktikaj. Politika neŭtraleco eble povas ŝajni iom nebula, nepraktika afero, sed ĝi estas vera avantaĝo: “Vi povas komunikiĝi kun eksterlandano en facile lernebla, politike neŭtrala lingvo. Tiel vi montras respekton al la alia homo, ne postulante, ke li aŭ ŝi parolu vian nacian lingvon.”

Tia mesaĝo allogus idealistojn, sed la emfazo pri nunaj avantaĝoj allogus samtempe neidealistojn kaj eĉ skeptikulojn, se niaj reklamoj estas sufiĉe honestaj kaj kredeblaj.

Ni ne troigu; ne necesas. Esperanto ja estas interesa kaj utila nun, hodiaŭ. Ni informu la ceteran mondon.

(Kaj jes, se sufiĉe da homoj aŭskultos kaj lernos, vi rajtos priridi min pro mia malkredo pri la fina venko, ĉar ĝi ja venos. Eble la sola praktika vojo al la fina venko iras tra Raŭmo.)

## “Du ioj”

Ŝercoj • Lee MILLER

Mi lastatempe ricevis malgrandan libreton en Esperanto. La aŭtoro ne estas dano, sed ŝajne oni produktis la libron en Danlando.

Miatakse, ĝi estas hejmfarita afero, per komputila presilo.

Mi nomas ĝin *Pamfleto, Printo de Danujo*.



## O kuloj

[*Supozeble inspirita de la reeldono de la novelaro “Okuloj” –Red.*]

O kuloj, sur la haŭto vi  
Ĝojegas pro la agoni’  
De viaj pikoj; sed la fin’?  
Manfrapo tuj mortigas vin.

## La vivo de Peĉjo

Ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de Izaak MOORE.

## Kolofono

Redaktoro/Editor: HOSS FIROOZANIA

**Kontaktu nin:** <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CMC #271205, University of Rochester  
500 Joseph C. Wilson Blvd.  
Rochester NY 14627-1205  
United States of America

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevatajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.eu>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuantoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



*Usona Esperantisto* (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

*Usona Esperantisto* is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.